

*Honoron al la sublimulo, al la dignulo, al la ĝuste
kaj tute vekiĝinta.*

Khuddakapatha – la mallonga teksto

el la budhisma palia kanono

El la palia tradukis kaj komentis
Gunnar Gällmo

(c) Gunnar Gällmo 2006

Eldonita de la tradukinto tra [lulu.com](http://www.lulu.com)

Pliaj ekzempleroj de la libro mendeblas ĉe
<http://www.lulu.com>

Enhavo

Enkonduko de la tradukinto 5

1. La tri rifuĝoj 8

2. La dek ekzercoreguloj 10

3. La tridek du partoj 12

4. La demandoj de la knabo 13

5. La benosutro 16

6. La juvelsutro 20

7. Ekster la bariloj 25

8. La trezoro-sutro 28

9. La sutro pri la ĉion ampleksanta amo 32

Enkonduko de la tradukinto

La palia Tripitako (*Tipi.taka*) estas la plej malnova el la konataj kanonaj budhismaj tekstaroj. Ĝi konsistas, kiel indikas ĝia nomo, el tri pitakoj (palie *pi.taka*, laŭlitere "korbo"):

1. La pitako de la disciplino (*Vinayapi.taka*), kiu enhavas – krom bibliografion pri la Budho – ĉefe la regulojn pri la vivo de bhikŝuoj kaj bhikŝuinoj (t. e. la budhismaj gemonahoj).

2. La pitako de la sutroj (*Suttapi.taka*), kun la paroladoj de la Budho kaj liaj ĉefaj personaj disĉiploj. (Bonvolu noti ke la difino en PIV de "sutro" kovras nur la hinduan uzon de tiu termino, ne la budhisman.)

3. La pitako de la pura dharmo (*Abhidhammapi.taka*), kun detala pritrakto de la budhisma psikologio, priskribata en seka stilo sen la literaturaj ornamoj de la du unuaj pitakoj.

La sutropitako siavice konsistas el kvin ĉefaj partoj:

1. La kolekto de longaj sutroj (*Diighanikaaya*), entute 34.

2. La kolekto de mezlongaj sutroj (*Majjihmanikaaya*), entute 152.

3. La kolekto de grupigitaj sutroj (*Sa"myuttanikaaya*), entute 2889 malpli longaj tekstoj, laŭteme aranĝitaj en 56 subkolektojn.

4. La kolekto de numeritaj sutroj (*A"nguttaranikaaya*), entute almenaŭ 2308, aranĝitaj en 11 subkolektojn, el kiuj la unua temas pri aferoj de kiuj ekzistas nur unu en ĉiu kategorio, la dua pri aferoj de kiuj ekzistas du en ĉiu kategorio kaj tiel plu.

5. La kolekto de mallongaj sutroj (*Khuddakanikaaya*), malpli kohera aro de pli memstaraj tekstoj, el kiuj *Khuddakapaa.tha* estas la unua.

La tutaĵo – ampleksa kiel ĉirkaŭ 11-foje ka kristana biblio – originis kiel literaturo buŝa. Laŭ la klasika tradicio oni recitis, redaktis kaj parkerigis ĝin dum pluraj sinsekvaj koncilioj (palie *sa"ngaayana*), el kiuj la unua tuj post la morto de

la Budho, la dua cent jarojn poste kaj la tria dum la tempo de la imperiestro Asoko. Tiuj tri okazis en Hindio, kaj la tria fine aldonis la lastan parton de la Ahidhammapitaka. Dum la kvara koncilio, en Cejlono en la unua jarcento antaŭ Kristo, oni fine fiksis la tekston ankaŭ skribe, sur palmfolioj. Du pluaj koncilioj okazis en moderna tempo en Birmo: la kvina en Mandalay en 1870 kaj la sesa en Ranguno en 1956.

Dum la lasta, oni decidis aldoni al Khuddakanikaaya la ĝis tiam dum pli ol dumil jaroj plej aĝajn post-kanonan pali-tekston, ekde nun do kanona: *Milinda-pa~haa* ("La demandoj de Milinda").

Oni kredas ke Khuddakapaa.tha origine estis kompilita kiel introduka manlibro por tiuj novicoj, kiuj intencis iam monaĥiĝi; pluraj el ĝiaj tekstoj troveblas ankaŭ aliloke en la Tripitako.

1. La tri rifuĝoj

Estas esence ĉi tiuj rifuĝoj, kiuj difinas budhanon.

En la Budho mi rifuĝas.

En la Dharmo mi rifuĝas.

En la Sangho mi rifuĝas.

Duafoje en la Budho mi rifuĝas.

Duafoje en la Dharmo mi rifuĝas.

Duafoje en la Sangho mi rifuĝas.

Triafoje en la Budho mi rifuĝas.

Triafoje en la Dharmo mi rifuĝas.

Triafoje en la Sangho mi rifuĝas.

*La vorto **Budho** ĉi tie ne nepre signifas la historian budhon, sed ĉiun homon kiu atingis la saman komprennivelon. La **dharmo** estas tio kion la budhoj instruas, la plej esenca realo, kaj la **sangho** estas la budhisma komunumo. En la **theravada** skolo, fondita sur la palilingvaj tekstoj, la vorto kutime signifas aŭ la komunumon de gemonahoj, senkonsidere kiom ili avancis en sia evoluo, aŭ la komunumon de tiuj kiuj avancis tro por povi denove malavanci, ankaŭ se laikaj. En*

*certaj aliaj skoloj, la vorto "sangho" povas signifi
la komunumon de ĉiuj budhanoj.*

2. La dek ekzercoreguloj

*Ĉi tiujn dek ekzercoregulojn praktikas theravadaj genovicoj kaj gemonaĥoj. Por laikoj validas la kvin unuaj, tamen kun malpli postula versio de la trio – **kaamesu micchaacaara**, "sensplezura misagado", anstataŭ **abrahma-cariya**, "ne-ĉasteco".*

Cetere, multaj laikoj dum apartaj okazoj praktikas "la ok ekzercoregulojn", kiuj estas fakte naŭ, ĉar la sepa el la ok kombinas la formulaĵojn de la sepa kaj oka el la subaj dek.

1. La ekzercregulon ne lezi vivon mi akceptas.
2. La ekzercregulon ne preni nedonitaĵojn mi akceptas.
3. La ekzercregulon ne vivi malĉaste mi akceptas.
4. La ekzercregulon ne paroli false mi akceptas.
5. La ekzercregulon ne uzi trinkaĵojn ebriigajn, trinkaĵojn fermentitajn, ebriigilojn apatiigajn, mi akceptas.

6. La ekzercregulon ne manĝi malĝustatempe mi akceptas.

Theravadaj genovicoj kaj gemonahoj prenu solidajn manĝaĵojn nur dum la tempo inter matenkrepusko kaj tagmezo.

7. La ekzercregulon rezigni dancadon, kantadon, muzikon kaj distraĵojn mi akceptas.

8. La ekzercregulon rezigni florkronojn, parfumojn, ŝmiraĵojn kaj portadon de ornamaĵoj mi akceptas.

9. La ekzercregulon rezigni altajn kaj grandajn litojn mi akceptas.

10. La ekzercregulon ne ricevi oron aŭ arĝenton mi akceptas.

3. La tridek du partoj

Sekvas medito pri la eroj de la korpo, praktikata por malpliigi la korpan deziron. Li listo troveblas plurloke en la Tripitako, foje en ĉi tiu ordo, foje kun la cerbo anstataŭe je la fino de la listo.

En ĉi tiu korpo troveblas kapoharoj, korpoharoj, ungoj, dentoj, haŭto, muskoloj, tendenoj, ostoj, medolo, renoj, koro, hepato, pleŭro, lieno, pulmoj, intestoj, mezentero, stomakokontento, fekaĵo, cerbo, galo, muko, puso, sango, ŝvito, graso, larmoj, sebumo, salivo, nazmuko, sinovio, urino.

4. La demandoj de la knabo

Serio da demandoj, pri kiuj oni povas ekzameni la novicojn. Similaj listoj – "Kio estas unu"? kaj tiel plu – troveblas en pluraj kulturoj kaj religioj.

1. Kio nomiĝas unu?
Ĉiuj estaĵoj vivas pro nutraĵo.
2. Kio nomiĝas du?
Psiko kaj korpo.
3. Kio nomiĝas tri?
La tri sentoj.

La agrabla, la malagrabla kaj la nek nek.

4. Kio nomiĝas kvar?
La kvar noblaj veroj.

La veroj pri la nekontentigo, la kaŭzo de la nekontentigo, la fino de la nekontentigo kaj la vojo al la fino de la nekontentigo.

5. Kio nomiĝas kvin?
La kvin alkroĉiĝkolektoj.

La kvin eroj de vivantulo, precipe de homo: korpo, sentoj, perceptoj, volo, konscio.

6. Kio nomiĝas ses?

La ses internaj sensoj.

Vido, aŭdo, flaro, gusto, tuŝo kaj penso.

7. Kio nomiĝas sep?

La sep eroj de vekigo.

Atento, investigado de la fenomenoj, forto, ĝojo, klareco, koncentrado, mensa ekvilibro.

8. Kio nomiĝas ok?

La nobla okera vojo.

Ĝusta rigardado, ĝusta pensado, ĝusta parolado, ĝusta agado, ĝusta vivtenado, ĝusta strebado, ĝusta atentado, ĝusta koncentrado.

9. Kio nomiĝas naŭ?

La naŭ estaĵloĝejoj.

Naŭ malsamaj niveloj kie vivanta estaĵo povas

naskiĝi, ekde la plej malagrablaj ĝis la plej sublime agrablaj.

10. Kio nomiĝas dek?

Pro dek kvalitoj oni nomiĝas arahanto.

*Perfektedo en la ok eroj de la nobla okera vojo
supre, cetere en ĝusta scio kaj ĝusta liberiĝo.
Arahanto estas honom kiu liberigis sin de ĉiuj
deziroj.*

5. La benosutro

(Ma"ngalasutta)

Tiel mi aŭdis:

Iam la sublimulo restadis apud Savatthi, en la Ĝeta-arbaro, en la ĝardeno de Anathapindika. Tiam certa devao*, je la fino de la nokto**, lumigis la tutan Ĝeta-arbaron per sia pompo, iris al la sublimulo, salutis lin respektoplene, ekstaris apude kaj alparolis lin per verso:

** Devao – ofte iom misgvide tradukita per "dio" – estas estaĵo vivanta en pli agrabla nivelo ol la homa, sed sen esti senmorta, nek nepre aparte saĝa.*

*** Aŭ "dum bela nokto" – ambaŭ interpretoj estas eblaj (palie "abhikkantaaya rattiya").*

1. "Multaj devaĵoj kaj homoj
pensas pri benoj,
bonon deziras.
Klarigu la plej altan benon*!"

** Aŭ "protekton" (palie "mangala").*

2. "Ne iri kun nesciemuloj,
iri kun saĝuloj,
respekti respektindulojn –
jen la plej alta beno.

3. En taŭga loko loĝi,
esti aginta merite,
mem havi ĝustan intencon –
jen la plej alta beno.

4. Granda klereco kaj kapablo,
bone ekzercita memdisciplino,
bone dirita ĉiu parolo –
jen la plej alta beno.

5. Servi gepatrojn,
prizorgi edzinon kaj idojn,
vivteni sin pace –
jen la plej alta beno.

6. Esti donema kaj vivi virte,
prizorgi parencojn,
agi sen damaĝi –
jen la plej alta beno.

7. Forlasi malbonon, rezigni ĝin,
ne trinki ebriigilojn,
esti vigla inter la aĵoj –
jen la plej alta beno.

8. Respekto kaj humileco,
kontentemo kaj dankemo,
ĝustatempe aŭdi la dharmon –
jen la plej alta beno.

9. Esti pacienca kaj facile instruebla,
vidi ŝramanojn*,
ĝustatempe diskuti la dharmon –
jen la plej alta beno.

** "Ŝramanoj" estis origine, en la antikva Hindio, liberaj asketoj metintaj sin ekster la kastsistemo, dominata de la brahmanoj. La estonta Budho estis unu el ili, kaj ĉi tie verŝajne estas celataj unuavice budhismaj monaĥoj.*

10. Regi sin kaj esti ĉasta,
vidi la noblajn verojn,
atingi nirvanon –
jen la plej alta beno.

11. Se ies menso ne tremas
kiam tuŝata de mondaj aferoj,
senĉagrena, senpasia kaj sekura –
jen la plej alta beno.

12. Kiuj tiel agadis,
nenie venkitaj,
ĉie iradas feliĉe.
Jen por ili la plej alta beno."

6. La juvelsutro

(Ratanasutta)

1. Kiuj ajn estaĵoj ĉi tie estas kune,
ĉu ligitaj al la tero ĉu al la aero:
estu ili ĉiuj ĝojaj
kaj aŭdu ili zorge la diroton.
2. Tial ĉiuj estaĵoj aŭskultu
kaj ĉionamplaksantan amon donu al homoj
tage kaj nokte donacojn portantaj.
Tial protektu ilin zorgeme!
3. Ĉiu riĉaĵo en ĉi mondo aŭ alia,
ĉiu valora juvelo en mondoj feliĉaj
por ni ne kompareblas kun la tiel evoluinta.
En la Budho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.
4. La ĉeso, la senpasio, la senmorto valora
kiujn atingis la Sakjo-saĝulo koncentrita -
nenio kompareblas kun tiu Dharmo.
En la Dharmo estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.

5. Kion la supera vekiĝinto laŭdis kiel puran
nomiĝas sinsekvaj koncentrostatoj.
Kun tiu koncentrado nenio kompareblas.
En la Dharmo estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.

6. La ok, kiujn laŭdas la konsciaj,
la kvar paroj,
disĉiploj de la bone evoluinta, meritas oferojn.
Donacoj al ili portas grandan frukton.
En la Sangho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.

7. Kiuj agas bone kun forta koro,
senpasiaj en la instruado de Gotamo,
kiuj atingis la atingeblan
kaj liberigis sin de morto,
libere ĝuas ili la freŝecon atingitan.
En la Sangho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.

8. Kiel fortan foston, enpuŝitan enteren,
la kvar ventoj ne povas skui,
tiel mi diras tiun esti vera homo
kiu tute vidas la noblajn verojn.

En la Sangho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.

9. Kiu komprenas la noblajn verojn,
bone klarigitaj de la profunde saĝa –
kiel ajn neglektemaj ili estas,
ili ne ekprenas okan iĝon.
En la Sangho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.

10. Kiu ne povas ne vidi,
tiu forlasas tri aferojn:
kredo je mio, dubo
kaj ritmo, se ajna.
Libera li estas de la kvar abismoj*,
kaj ne kapabla fari la ses plej gravajn misagojn**.
En la Sangho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.

** La vivo kiel besto, kiel malsata spirito (palie **peta**), kiel "titano" (palie **asura**) kaj en la plej malagrabra stato, "infero" (neniu el tiuj statoj estas eterna). Tio signifas ĉiuj vivniveloj krom tiuj kiel homo kaj kiel devao (vidu la noton al la *Benosutro supre*).*

*** Mortigi sian patrinon, mortigi sian patron,
mortigi arahanton (homon tute liberan de deziroj),
vundi Budhon, instigi skismon en la Sangho kaj
meti alian instruiston super la Budhon.*

11. Kiel ajn li agas malbone
korpe, parole aŭ pense,
li ne povas tion kaŝi.
Laŭdire tio ne eblas por vidanto.
En la Sangho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.

12. Kiel en bosko, en floranta arbopinto
dum la unua somera monato,
tiel li klarigis la plej bonan Dharmon
kondukantan al nirvano, al la plej alta bono.
En la Budho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.

13. La plej bona, plej scianta, plej donanta, plej
portanta
kaj senkompara klarigis la plej bonan Dharmon.
En la Budho estas la valora juvelo.
Per tiu vero estu bonfarto.

14. Elĉerpiĝis la malnova origino, ne estiĝas
nova

el senpasia menso en estonta vivo.

Ĉi semoj elĉerpitaj, ne plu inciteblaj,

la saĝuloj estingiĝas kiel jena lampo.

En la Sangho estas la valora juvelo.

Per tiu vero estu bonfarto.

15. Kiuj ajn estaĵoj ĉi tie estas kune,

ĉu ligitaj al la tero ĉu al la aero:

la tiel evoluintan, de devaĵoj kaj homoj laŭdatan

Budhon ni honoru. Estu bonfarto.

16. Kiuj ajn estaĵoj ĉi tie estas kune,

ĉu ligitaj al la tero ĉu al la aero:

la tiel evoluintan, de devaĵoj kaj homoj laŭdatan

Dharmon ni honoru. Estu bonfarto.

17. Kiuj ajn estaĵoj ĉi tie estas kune,

ĉu ligitaj al la tero ĉu al la aero:

la tiel evoluintan, de devaĵoj kaj homoj laŭdatan

Sanghon ni honoru. Estu bonfarto.

7. Ekster la bariloj

(Tiroku.t.tasutta)

1. Ekster la bariloj ili staras
kaj kie kuniras du aŭ kvar vojoj.
Ĉe la pordofostoj ili staras,
reveninte al la propra hejmo.
2. Inter multe da manĝo kaj trinko
kun pladoj solidaj kaj fluaj,
ilin neniu memoras
pro karmo de estaĵoj.
3. Tiel donas al la parencoj
tiuj, kiuj kompatas,
ĝustatempe puran, delikatan,
taŭgan trinkon kaj manĝon:
ĉi tio estu al vi, parencoj,
feliĉaj vi estu, parencoj.
4. Kiuj ĉi tie kunvenis,
ombroj de parencoj kunvenantaj,
sentas konvenan dankemon
inter multe da manĝo kaj trinko.

5. "Longe vivu niaj parencoj.
Danke al ili ni ricevis ĉi tion.
Al ni oni montris honoron.
La donintoj ne restos senfruktaj."

6. Ne tie kultivatas tero,
ne tie flegatas bovinoj.
Tie oni ne komercas,
ne per oro aĉetas kaj vendas.
Per kio ĉi tie estas donata vivtenas sin transe
la ombroj, kies tempo finiĝis.

7. Kiel pluvo, falinta sur monteto,
fluas en la valon,
tiel la ĉi tie donita
utilas al la ombroj.

8. Kiel riveroj plenaj
plenigas la maron,
tiel la ĉi tie donita
utilas al la ombroj.

9. "Li donis al mi, li agis por mi,
parencoj, amikoj, kunuloj ili estis al mi."
Donojn oni donu al la ombroj
kaj memoru kion ili faris.

10. Nek plorado, nek ĉagreno,
nek alia lamentado
iel helpas la ombrojn.
Jen staras la parencoj.

11. Sed tiuj ĉi donoj donitaj,
bone apogataj en la sangho,
longe estos bonaj,
tuj utilas.

12. Tia estas parencodevo,
granda respekto al la ombroj montrita,
forto al monaĥoj donita,
al vi merito ne malgranda gajnita.

8. La trezoro-sutro

(Nidhika.n.dasutta)

1. Trezoron enfosas homo
profunde, proksime al akvo.
"Se mi bezonos, se mi devos,
utila al mi ĝi estos,

2. se reĝo fifamigos min,
se ŝtelisto malriĉigos min,
se mi devos pagi ŝuldon,
se min trafos malsato aŭ akcidento" –
pro tiaj kialoj en la mondo
trezoron enteren li fosas.

3. Kiel ajn bone lokita ĝi estas
profunde, proksime al akvo,
tamen ne ĉio, ne ĉiam
servas liajn bezonojn.

4. La trezoro malaperas de sia loko,
aŭ li forgesas kie ĝi kuŝas,
aŭ serpentoj forigas ĝin,
aŭ rapiduloj ŝtelas ĝin,

5. aŭ malkaraj heredontoj
prenas ĝin kiam neniuj vidas.
Kiam liaj meritoj elĉerpiĝis,
tiam ĉio perdiĝos.

6. Kiam per donemo kaj moralo,
memkontrolo kaj membrido
trezoro estas bone lokita,
ĉu fare de ino ĉu de viro,

7. en tumulto aŭ komunumo,
ĉe sola homo aŭ fremdulo,
ĉe patrino aŭ ĉe patro
aŭ ĉe pli aĝa frato –

8. jen trezoro bone lokita.
Neniuj ĝin prenos, ĝi vin sekvos.
Ĝin forlasinte kaj pluirinte
vi ĝin denove havos,

9. trezoron ne divitan kun aliaj,
ne ŝtelotan de rabistoj.
Agu saĝulo merite!
Jen trezoro kiu lin sekvos.

10. Tiu trezoro donas al devaĵoj kaj homoj
ĉion, kiun ili deziras.
Kion ajn sopiras devaĵoj –
ĉio estas per ĝi gajnota.

11. Belo kaj bona voĉo,
bona formo, bela korpo,
povo kaj respekto –
ĉio estas per ĝi gajnota.

12. Loka potenco, superregado,
la kara feliĉo regi la mondon,
en venontaj mondoj devaa potenco –
ĉio estas per ĝi gajnota.

13. Sukcesi iĝi homo,
ĝoji en devaa mondo
kaj atingi nirvanon –
ĉio estas per ĝi gajnota.

14. La beno de amikeco,
taŭga aplikado,
scio, liberiĝo, kontrolo –
ĉio estas per ĝi gajnota.

15. Juĝokapablo kaj malligo,
perfektecio de lernanto,
unuopa vekigo, bazo de luminiĝo –
ĉio estas per ĝi gajnota.

16. Tiel uzebla ĝi estas,
la beno de merito.
Tial la kleruloj laŭdas ĝin,
la saĝuloj agintaj merite.

9. La sutro pri la ĉion ampleksanta amo

(Karan.iyamettasutta)

1. Por sia propra feliĉo tiu,
kiu komprenis ĉi tiun trankvilon,
estu kapabla kaj sincera, sincerega,
konsentema, milda, malfiera,

2. kontenta kaj facile nutrata,
havanta malmultajn devojn, facilan konduton
kaj trankvilajn sentojn, saĝa,
modesta, inter familioj ne avara.

3. Neniel li alstrebu ion sensignifan
de aliaj saĝuloj mallaŭdeblan.
Feliĉaj kaj sekuraj ili estu.
Ĉiuj estaĵoj estu feliĉaj.

4. Kiuj ajn estaĵoj vivas -
timemaj aŭ sentimaj*, senescepte,
longaj kaj grandaj,
mezgrandaj, mallongaj, etaj kaj fortaj,

* aŭ "movantaj kaj senmovaj"; la paliaj vortoj
(*tasaa vaa thaavaraa vaa*) povas havi ambaŭ

signifojn.

5. videblaj kaj nevideblaj,
foraj kaj proksimaj,
naskitaj kaj naskotaj -
ĉiuj estaĵoj estu feliĉaj.

6. Ne unu la alian trompu,
nek malestimu ie ajn.
Pro kolero aŭ malico
neniu deziru suferon al alia.

7. Kiel patrino propran filon,
per sia vivo solan filon protektas -
tiel inter ĉiuj estaĵoj
li kultivu senliman koron.

8. Ame en la tuta mondo
li kultivu senliman koron.
supren, suben kaj ĉirkaŭen,
senmalhelpe, senmalame, senmalamikece.

9. Starante, irante, sidante
kaj kuŝante, dum li ne dormas,
tiun atenton li vivtenu.
Nobla oni ĉi tie nomas tiun staton.

10. Sen opinioj, virta
kaj vidkapabla
li ĝudezirojn forigas.
Certe li ne denove eniras uteron.

De la sama tradukisto/verkisto:

La Dharmo-pado (Eldona Societo Esperanto 2002)

Kelkaj faktoj pri la budhismo (Eldona Societo Esperanto 2002)

...

En Esperantio, la budhismon reprezentas Budhana Ligo Esperantista – serĉu en la reto, aŭ en la jarlibro de UEA, por trovi aktualan adreson!